

## HEROLDO DE ESPERANTO -NULIGO DE LA TRANSDONO (1998)

### Oficiala deklaro

1. Nia neprofitcela societo "Heroldo de Esperanto", aĉetis la samnoman gazeton de la fondinto Teo Jung en 1960 kaj daŭrigis ĝian eldonadon ĝis 1996 sub la 36-jara redaktado de Ada Fighiera-Sikorska.
2. En 1996 nia asocio senpage transdonis la gazeton al la Itala Interlingvistika Centro (Milano) sub la nepra kondiĉo -trifoje ripetita en la protokolo de la 17-a de julio 1996, subskribita ankaŭ de Ada en drama viv-cirkonstanco,- pri "respekto de la tradicio kaj principoj" de la gazeto. La tradicio kaj principoj estis, i.a. : la gazeto havas ĉefe informan karakteron pri la disvastigo de Esperanto; ĝi estas sendependa kaj supertendenca pri movadaj ideologioj kaj internaj konfliktoj.
3. Kiel ĉiuj povas konstati, la supraj kondiĉoj neniam estis respektataj de la nova redakcio. Jam fine de 1996 en la "raŭmisma" gazeto "Literatura Foiro" (LF) oni povis legi, ke post la akiro de "Heroldo" la raŭmistoj (malgranda tendenca grupo, preskaŭ nur eŭropa, kiu opozicias al la ĝenerala Esperanto-Movado, negative juĝas la Universalajn Kongresojn kaj proponas alternativan Esperanto-komunumon) posedas du gazetojn: la diritan LF kaj Heroldon mem. Konforme al la supre citita deklaro, la novaj faktaj posedantoj, kunaŭtoroj de la rezolucio de Raŭmo (Finnlando) en 1980, senrajte transformis la gazeton en personan organon de raŭmisma ideologia propagando kaj de siaj privataj kvereloj; en ĉiu numero ili daŭre kaj grandspace aperigadas tendencajn artikolojn sub propra nomo, sub aliaj kromnomoj aŭ prunteprenitaj aŭ elpensitaj subskriboj (Giorgio Silfer, Nicolas Vanof, Noor Weg kaj aliaj estas la sama persono; ankaŭ pluraj surpaperaj formalaj E-societoj estas liaj kreaĵoj).

La lukto de la nuna redakcio kontraŭ nia Movado, kontraŭ personaj kontraŭloj kaj kontraŭ aliaj Esperanto-gazetoj eskaladis ĝis senprecedence granda nombro da artikoloj kun ripetitaj en ĉiu numero klaĉoj, pikoj, subfosoj, rezolucioj, manifestoj, polemikoj, atakoj, provokoj kaj personaj skandaloj; sen paroli pri la utiligo de la gazeto por propagandi propran kandidatiĝon ĉe Akademiaj elektoj.

Ĉio tio semas malharmonion inter la esperantistoj kaj montras, ke la nuna "Heroldo" estas redaktata ekzakte laŭ la malaj principoj ol tiuj, kiuj inspiris Teo Jung kaj Ada - ambaŭ amataj, pacemaj, lojalaj agantoj en nia Movado- dum entute pli ol 70 redakciaj jaroj. Evidente, la raŭmistoj rajtas diskonigi siajn teoriojn, sed ne rajtas misuzi tiucele Heroldon kaj treti la volon de Ada.

4. Dum la pasintaj du jaroj nia societo vane provis per dekoj da privataj kaj publikaj atentigoj konvinki la novajn respondeculojn de la gazeto respekti la

fundamentan kondiĉon ligitan al la transdono de la gazeto, t.e. la respekton de ĝiaj tradicio kaj principoj.

5. Ĉar la supre citita kondiĉo de la transdono estis kaj estas malrespektata de la novaj eldonantoj, la transdono mem fariĝis senvalora kaj aŭtomate nuligis. Tial, nia Societo decidis repreni ĉiujn siajn antaŭajn rajtojn ek de 31-a de decembro 1999. Ek de nun, la eldon-kaj vendorajtoj de la nacilingvaj lernolibroj eldonitaj de nia societo iras senpage al landaj asocioj de la koncernaj lingvoj.
6. Fine, per la nuna komuniko la subskribinto nuligas sian alvokon (lasta numero de “Heroldo” de 1996), en kiu li petis abonantojn de “Heroldo” resti fidelaj al la nova redakcio. La esperantistoj laboru por la disvastigo de Esperanto, for de ideologioj, kiuj senhalte semas malkonkordon per la mono de la abonantoj de “Heroldo”.

7. Nia societo sendos al ĉiu petanto kopion de la supre menciita protokolo de 1996 pri la transdono de “Heroldo” kaj la koncernan postan korespondadon.

Torino, la 1-an de oktobro 1998

G. C. Fighiera, prezidanto de la  
leĝe registrita societo sen profita  
celo “Heroldo de Esperanto”.  
(Renovitita Estraro)

---

(ALDONO 2018)

Por pliaj informoj legu ankaŭ

-”L. L. Zamenhof. La homo kaj lia idearo en liaj propraj vortoj” de G.C. Fighiera. Torina Esperanto-Centro, p. 29

- “La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka”, sama aŭtoro, UEA, 2010, p. 21

“Unu rano en marĉo”, sama aŭtoro, en Beletra Almanako, n-ro 21, oktobro 2014, p. 112.